

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 83, julio-aŭgusto 2026



Universala Esperanto-Asocio

UEA festis la Internacian Tagon de Espero, specialan tagon de UN



Laŭ lastatempa mesaĝo adresita al Unuiĝintaj Nacioj, “en la jaro 2025, unuafoje, Unuiĝintaj Nacioj festis la 12-an de julio kiel Internacian Tagon de Espero. Tiu speciala tago estis establita por memori la mondan komunumon, ke Unuiĝintaj Nacioj estis fondita en la jaro 1945 en spirito de optimismo post la amasa detruo de la Dua Mondmilito, kaj kun espero, ke neniam plu la homaro permesu al si esti superita de tia malamikeco kaj krueleco kaj homa suferado. Tiu fervora kredo je paco motivis la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj de la jaro 1945 kaj enkorpiĝis en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj (1948).

“En sia Statuto, Universala Esperanto-Asocio deklaras respekton de homaj rajtoj necesa kondiĉo por la Asocia laboro. La Internacia Lingvo Esperanto portas eĉ en sia propra nomo la ideon de espero.

Ludoviko Zamenhof, la fondinto de la lingvo, nomis sin “Esper-anto” (homo kiu esperas) kaj plulaboris por inspiri parolkomunumon kiu hodiaŭ havas anojn en la plejparto de la mondo. La komunumo laboras por disvastigi reciprokan komprenon bazitan je samrajteco, instigi komunuman engaĝiĝon por la komuna bono, kaj krei kulturon de paco en mondo ĉiam pli sieĝata de malamikeco kaj miskompreno.

“En tiu ĉi epoko de necerteco, ni instigas ĉiujn homojn de bona volo, kaj precipe la Esperanto-komunumon, unuiĝi ĉirkaŭ dialogado, komunuma agado, kaj engaĝiĝo kun la mondo, en espero kaj agado por pli bona, pli paca kaj pli komprenema monda komunumo.”

Monda kongreso de Esperanto ekkomenciĝas

Finaj preparoj nun ekruliĝas por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Graz, Aŭstrio, de 1 ĝis 8 aŭgusto. Pli ol 1000 partoprenantoj estas atendataj el 63 landoj. Detaloj troveblas

<https://uk.esperanto.net/2026/kongresalibro> kaj <https://uk.esperanto.net/2026/programo>. La venontjara kongreso antaŭvide okazos en Melburno, Aŭstralio, de 3 ĝis 10 julio 2027. Tiu de 2028 okazos en Kaunas, Litovio.

Zaozhuang-a Universitato, Ĉinio, gastigas la ĉi-jaran konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

La 10-a ĝis la 16-a de julio estas la datoj de la nunjara konferenco de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu okazas en Zaozhung-a Universitato (ZZU), Ĉinio. La universitato estis fondita en 1978 kaj troviĝas en la vivoplena urbo Zhaozhuang, Ĉinio. ZZU estas ampleksa institucio konata pro sia dediĉo al altkvalitaj edukado kaj esplorado. Kiel universitato kiu kultivas novigon kaj internacian kunlaboron, ZZU proponas diversan gamon da programoj kiuj altiras studentojn el la tuta terglobo. Per sia forta fokuso je praktika lernado kaj komunuma engaĝiĝo, ĝi proponas subtenan situacion por internaciaj studentoj kiuj celas enprofundiĝi en la ĉinan kulturon dum ili sekvas siajn studajn celojn. La bonveniga etoso kaj emfazo je tutmondaj perspektivoj igas ĝin bona elekto por aspiraj studemuloj. Ekde la jaro 2018, ZZU proponas subdiploman specialaĵon pri Esperanto. La universitato ankaŭ havas la solan Esperanto-muzeon en ĉina universitato.

Esperanto estis deklarita parto de la nemateria heredaĵo de Aŭstrio

Kiel parto de la programo de Unesko pri nemateria heredaĵo, la Internacia Lingvo Esperanto estis deklarita parto de la nemateria heredaĵo de Aŭstrio, laŭ lastatempa anonco de la aŭstra registaro. La anonco notas, ke Esperanto “estas konstruita lingvo kreita de Ludoviko Zamenhof en 1887, cele al proponi al homoj ĉirkaŭ la mondo neŭtralan kaj facile lerneblan ilon de komunikado por antaŭenigi pacon. Aktiva komunumo en Aŭstrio gardadas tiun kulturon tra pli ol 120 jaroj. Ĝiaj membroj kunvenas regule por lingvaj kursoj, studogrupoj, festoj kaj konferencoj – agadoj kiuj produktis konsiderindan aron da verkoj en literaturo, muziko kaj teatraj artoj.”

“Esperanto aperis en Aŭstrio fine de la deknaŭa jarcento kaj spertis sian apogeon en la jaroj post la Unua Mondmilito. Post periodoj de disrompiĝo sub Nacia Socialismo, la movado reviviĝis post la jaro 1945 kaj restas aktiva hodiaŭ. La portantoj de Esperanto-kulturo inkluzivas organizojn kiel la Aŭstra Esperanto-Asocio kaj la Stiria Esperanto-Societo, komplementataj de neformalaj grupoj kaj komunumoj. Iliaj agadoj varias de klubvesperoj, lingvaj kursoj kaj grupvojaĝoj ĝis publikigo de gazetoj kaj formoj de digita retumado. Oni ĉiam pli ofte transsendas la lingvon per retaj platformoj kaj kun subteno de vastaj internaciaj kontaktoj....

“Esperanto-kulturon fundamentas la ideo, ke homoj povas interagi sur egala bazo trans lingvaj baroj, sen lingvaj hierarkioj, kaj kun respekto al lingva kaj kultura diverseco. Apud uzado de neŭtrala dua lingvo, la kulturon karakterizas komunajn praktikojn kiel ekzemple Pasporta Servo – reto kiu proponas reciprokan senpagan loĝigon -- kaj la ‘Gufujon’ – tradician kunvenejon por malfruvesperaj interŝanĝoj en junularaj aranĝoj.

“Fondita en la jaro 1927, la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno rolas kiel ŝlosila centro por kolekti kaj antaŭenigi internacian Esperanto-kulturon. Internaciaj konferencoj, kulturaj aranĝoj, la ĉiujara Festivalo Zamenhof – okazanta ĉiujare de 1974 – kaj la Mondaj Esperanto-Kongresoj gastigataj de Aŭstrio jam plurokaze – ĉio ĉi helpas akceligi tiun vivantan praktikon. Partopreno en Esperanto-kulturo estas malferma al ĉiuj interesatoj ĉar la lingvo estis intence formita por esti neŭtrala kaj inkluziva.”

<https://www.unesco.at/en/culture/intangible-cultural-heritage/inventory/element/esperantokultur-in-oesterreich-esperantokulturo-en-austrio>

Tago de Esperanto 2026: daŭripova evoluigo kaj volontulado



La 26-an de Julio ni festas la Tagon de Esperanto, datreveno de apero de la Internacia Lingvo Esperanto antaŭ 139 jaroj. Esperanto naskiĝis kun simpla sed profunde aktuala celo: alproksimigi homojn per komunikado je egalaj kondiĉoj. Pli ol planita lingvo, ĝi reprezentas internacian movadon subtenatan de volontula laboro, kunlaboro kaj respekto inter kulturoj.

Volontulado estas unu el la kolonoj de esperantaj organizoj tutmonde, same kiel respekto por la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj ankaŭ nuntempe, klopodo kontribui al la 17 Celoj de UN por Daŭripova Evoluigo. La laboro de tiuj organizoj antaŭenigas internaciajn retojn de solidareco, inkluzivigo, kunlaboro, redukto de malegalecoj kaj fortigo de tutmondaj partnerecoj.

Ekzemple, volontula instruado de la lingvo Esperanto por redukti lingvajn barojn kaj plilarĝigi aliron al lernado kontribuas al celo numero 4 pri edukado. Simile, ni kunlaboras kun celo numero 16 (Paco, Justeco kaj Fortaj Institucioj) per antaŭenigo de interkultura dialogo bazita sur egaleco inter popoloj kaj konektado de homoj sen lingva imperiismo, en la konstruado de kulturo de paco.

Konstrui pli bonan, pli justan kaj pli daŭripovan mondon por ĉiuj dependas ne nur de publikaj politikoj, sed ankaŭ de la volontula engaĝiĝo de civitanoj, kiuj decidas kunlabori por la komuna bono. Unuigante volontuladon, edukadon kaj interkulturan dialogon, Esperanto daŭre montras, ke ĉi tiu konstruado estas kolektiva klopodo. Kiel emfazis la nuna Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, Annalena Baerbock, ni estas "pli bonaj kune".

Ni invitas la tutan internacian komunumon sperti kun ni la uzon de Esperanto kiel ilo por konstrui kunlaboron bazitan sur universala egaleco kaj valorigo de diferencoj. Ni renkontiĝos en Graz, Aŭstrio, de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto, ĉe la 111a Universala Kongreso de Esperanto...

Ekzameni la minacojn kaj eblecojn de artefarita inteligento en UN

La Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj arigis pli ol 500 partoprenantojn en sia jara simpozio, kiu okazis la 8-an de majo. Sub la titolo "Lingvoj kaj Teknologio en Necerta Mondo: Minacoj kaj Ŝancoj," ĝi fokusiĝis je ŝanĝiĝantaj lingvaj teknologioj, precipe rilate al Artefarita Inteligento. Inter la partoprenantoj estis universitatoj el la tuta mondo, stabanoj de UN, reprezentantoj de UN-misioj, kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj (inkluzive de membroj de la Komitato pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, Substanca Komitato de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj CoNGO).

La virtuala konferenco havis kvar celojn:

1. Liveri aktualajn empiriajn kaj spertatajn perspektivojn pri la funkcioj kaj implicoj de lingvaj teknologioj.
2. Faciligigi dialogadon inter praktikaj interesatoj pri UN rilate la rolon de teknologio en perado de multlingva komunikado.
3. Altigi konscion pri eblecoj kaj stumbligoj en lingvaj teknologioj, precipe rilate al AI.
4. Nutri daŭran impulson inter interesatoj por enkonduki multlingvismon en la laboron de UN je ĉiuj niveloj.

Prelegantoj inkluzivis Natalia Bondonno, de la Departemento de UN pri Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Mastrumado (DGACM); Bertrand Frot, de la Internacia Civil-Aviada Organizo (ICAO), kaj Guolei Cai kaj Kate Carrara, de la Internacia Telekomunika Unio. Ĉefparolanto estis Prof. Antonella Sorace, Profesoro de Disvolva Lingvistiko en la Universitato de Edinburgo.

Finajn rimarkojn liveris membroj de la Studogrupo: Carol Benson, Francis M. Hult, Lisa MicEntee-Atalianis, kaj Rosemary Salomone. La ĝenerals konkludo estis, ke temis pri grava ĉapitro en la daŭranta dialogo inter tradiciaj lingvaj servoj kaj la novaj eblecoj (kaj riskoj) proponataj de AI.

Kunlaboris kun la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj en organizado de la simpozio la Komitato de NROj pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, Esperantic Studies Foundation, kaj la Konsorcio por Lingvopolitiko kaj Lingvoplanado. Subtenis ankaŭ AIIC (Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj) FIT (Internacia Federacio de Tradukisto), kaj UEA (Universala Esperanto-Asocio).

La ĉiujara simpozio naskiĝis el kunlaboro en la jaro 1982 inter Universala Esperanto-Asocio kaj la tiama Departemento de UN pri Konferencaj Servoj. Ĝi restas konstanta elemento en la kalendaro ĉirkaŭ UN dum la plimulto de la jaroj de post tiam.